# ANGOLA

# SENDEPENDIĜO

NGANGU Nduantoni Bakidila

kun kontribuaĵo
de
A.P. DA SILVA
kaj aneksaĵoj.

antaŭparolo de
Henri MASSON

La Juna Penso
N°103A Marto 1975

## Antaŭparolo

Sovaĝuloj ekzistas en ĉiuj landoj senescepte. La haŭtkoloro nenion ŝanĝas.

Iam, Francio - aŭ pli ĝuste la franca registaro - pretendis civilizi vastajn teritoriojn; inter ili estis Alĝerio. La 10an de junio 1846, en la Ĉambro de la deputitoj, la poeto Lamartine ekkriis :

"Jen tiu paco, Sinjoroj ! Mi lasas al vi la juĝon pri la vorto, kiun ĝi meritas tie : kie ĝi lasis dezerton, vakuon, sangon, la registaro nomis tion la pacigo de Alĝerio." (1)

Tamen, ĉirkaŭ la jaroj 1950, oni ankoraŭ instruis en francaj lernejoj, ke generalo Bugeaud (Büĵo) estas tiu granda homo, kiu pacigis Alĝerion. Same pri generalo Hoche (Oŝ), kiu "pacigis" Vendeon en la jaro 1793 (2) per metodoj, kiujn ne uzas eĉ la plej aĉaj krimuloj : ekstermado de la loĝantaro, forbruligo de domoj kaj rikoltoj, ktp; liaj taĉmentoj nomiĝis "inferaj kolumnoj".

Dum la alĝeria milito por sendependiĝo, oni denove uzis la vorton "pacigo". Sed ĝi eble eluziĝis, ĉar la soveta registaro preferis "normaligi" la situacion en Ĉeĥoslovakio, dum la usona provis fari la samon en Vjetnamio aŭ eĉ "vjetnamigi" la konflikton.

Nun ni citu Bugeaud mem :

"Se la armeo perfortis la sentojn de humaneco, kiuj animas ĝin same altgrade, kiel ĉiu alia parto de la nacio, tio estas pro patriota sento". (1)

Iu oficiro de Bugeaud, kolonelo Lucien de Montagnac (Lüsien de Montanjak) skribis :

"Jen kiel oni devas militi kontraŭ la Araboj. Mortigi ĉiujn virojn ĝis la aĝo de 15 jaroj, forpreni ĉiujn virinojn kaj infanojn, unuvorte neniigi ĉion, kiu ne rampos antaŭ niaj piedoj, kiel hundoj...

Por forpeli la nigrajn ideojn, kiuj foje sieĝas min, mi tranĉigas kapojn, ne artiŝokkapojn, sed ja homajn kapojn.

... Mi trovas mian tutan rekompenson en la plenumo de miaj devoj kaj en la kontento de mia konscienco"(1).

Ankaù en Vjetnamio usonaj oficiroj uzis helikopterojn dum siaj liberaj momentoj, kaj per lornekipitaj pafiloj ekzercis sian lertecon sur ĉion, kiu moviĝis. Tiel pravigo estis facila : se vjetnama civilulo sin kaŝis pro timo, tiam la pafinto povis argumenti, ke la viktimo havis suspektindan sintenon.
Jen do pri la "civiliza misio" !

Por fari el infanoj homojn, necesas ilin eduki. Por fari el homoj soldatojn, necesas ilin trompi. Por transformi soldatojn en murdistojn kaj barbarojn, sufiĉas la tempo kaj la cirkonstancoj post prepara brutigo. La armeoj protektas la popolojn same, kiel prostituistoj "protektas" la virinojn.
En ĉiuj reĝimoj oni sukcesis pravigi la krimojn de la milito. Jam en la lernejoj, la infanoj alkutimiĝas al pensmaniero, kiu povas fariĝi obsedo : ekster niaj landlimoj estas minaco, nia lando havas noblan sintenon, noblajn celojn, ĝi estas pacama, sed, se necesus ...
Jes, se necesus !

Sed ofte okazis, ke oni preparis la terenon por tiu neceso.
Dum jarcentoj oni instruis al ĉiuj infanoj de la mondo, ke ĉiu el ili devas ami sian tribon, sian landon, sian "patrujon". Alidirite, pli gravas amo al la "ujo" de la gepatroj ol al la gepatroj mem. Tiu amo havas mortodoron. Ĝi ne estas amo, sed artefarita sento, rezulto de impresoj kaj mekanike ripetataj maksimoj, de mensogoj kun humaneca aspekto.
Milito ĉiam vekas malbonajn instinktojn, eĉ kiam temas pri mense sanaj homoj; sed ĝi estas la orepoko de ĉiuj frenezuloj, obsedatoj, sadistoj, sentaùguloj, kaj aliaj, al kiuj ĝi ebligas senbridigon de iliaj instinktoj. Kompreneble, ĝi estas ankaù ideala situacio por la fabrikantoj de armiloj kaj ĉiuspecaj amasmurdiloj : ju pli da "patrujoj", des pli da armiloj por vendi kaj des pli da okazoj por ilin uzi !
La militista teknologio multekostas. Por perfektigi kaj modernigi siajn militrimedojn, multaj landoj eksportas armilojn; Francio estas en la tria vico de la eksportan-

toj, kaj eĉ la "neŭtralaj" Svedio kaj Svisio enviciĝis en tiun hontindan koncerton. Sed tiuj armiloj ne estas la plej modernaj; fabrikataj en grandaj serioj, foje de pluraj jaroj, ilia fabrikadkosto jam fariĝis sufiĉe malalta por ebligi gravan profiton per eksportado al landoj de la Tria Mondo... kiuj havas pli urĝajn bezonojn.

"Ni scias, ke la disvastigita armiĝemo forprenas la ofendan sumon de 220.000 milionoj da dolaroj kontraŭ 8.600, kiujn de la 16 plej riĉaj nacioj de la okcidenta mondo ricevis en 1972 la subevoluintaj landoj sub formo de publika asistado". (Luis Echeverria Alvarez, Prezidento de Meksikio).

Nova lando ĝuste liberiĝis el la koloniismo : Angolo.

Ĉu ĝi sekvos la vojon jam elektitan de multaj aliaj ?

Nduantoni Bakidila NGANGU vivas en Zairio (eks-kolonio de Belgio), sufiĉe proksime de Angolo; tial li povis kontakti rifuĝintojn el tiu lando. En tiu broŝuro, li priskribas mallonge kelkajn faktojn pri kiuj la Portugaloj malmulte sciis.

Intertempe okazis transformiĝoj en Angolo kaj Portugalio kaj oni povas antaŭvidi pluan evoluon. Tial pli gravas la spirito de tiuj tekstoj ol la enhavo mem; ili celas ĉefe montri, ke bonvolemo ekzistas en ĉiuj landoj senescepte, ke la haŭtkoloro nenion ŝanĝas.

Por reliefigi tiun spiriton, ni opiniis, ke estus tre utile aperigi ankaŭ kontribuaĵon de A.P. DA SILVA (Lisbono) kaj aneksaĵojn.

Sama reĝimo, kiu atentis pri unudirekta informado por pravigi siajn krimojn, kontraŭstaris la universalan lingvon esperanto. Ne mirige.

Jen do okazo, ĝuste per esperanto, por revizii ĉiujn niajn principojn, forigi antaŭjuĝojn, malaperigi vundospurojn, forgesi nigrajn epokojn, ebligi liberan informadon kaj prepari la vojon al dialogo, al rekta dialogo inter la popoloj mem.

H. MASSON

(1) El "Union Pacifiste" (aŭg.-sept.1974) : "Une histoire invraisemblable", sub la plumo de Jean Gauchon.

(2) Vendeo : departemento de okcidenta Francio; kun najbaraj departementoj ribelis kontraŭ la Revolucio parte pro religio, parte pro rojalismo, sed ankaŭ pro la ekcesoj de la nova reĝimo.

# Iom pri Angolo

Angolo situas en la okcidenta parto de Afriko. Norde ĝi estas limigita per Zairio, oriente per Zairio kaj Zambio, sude per Namibo (Sudokcidenta Afriko), okcidente per Atlantiko. La areo estas 1.246.700 kvadratajn kilometrojn ampleksa, alidirite 14-foje pli ol Portugalio. En la lando vivas 4.500.000 loĝantoj. Ni aldonu ankaŭ, ke la norda parto de Angolo "Kabindo" estas enklavo, kiu situas norde de la estuaro de riverego Zairo.

Estas en la dua duono de la 15-a jarcento, ke Angolo estas ekokupita de la portugaloj post la malkovro far la ŝipisto Diogo Cao en la jaro 1482. Malgraŭ tiu tre malnova okupado, la loĝantaroj de tiu vasta lando estas ankoraŭ nun submetitaj al feŭda reĝimo praktikita dum la eŭropa Mezepoko.

De jarcentoj la politiko de la koloniistoj en Angolo konsistas el alkonduko de ĉiuj ĉifonuloj, ĉiuj nekapablaj metropolanoj. Familioj de malriĉaj kamparanoj, analfabetoj el Portugalio eklogis kiel kolonianoj sur bienoj rabitaj al angolanoj, kiuj, malprovizitaj je vivrimedoj, spertas siavice la plej nigran mizeron.

La amasa alveno de tiuj kamparanoj konkurencis al la portugalaj kaj afrikaj manlaboruloj. Por redukti la nombron de la blankaj senlaboruloj, la koloniista administracio konsentas al ili monopolon pri ĉiuj oficoj. La metioj de taksiisto, kelnero, balaisto kaj vendisto estas rezervitaj por la nuraj portugaloj. Sur la konstruejoj la submastroj kaj la konstruistoj estas blankuloj dum la braklaboro estas lasita al nigruloj. Dank'al tiu krianta diferencigo, la blankaj laboruloj estas pli bone pagitaj kaj ĝuas ĉiujn sociajn avantaĝojn dum iliaj afrikaj kolegoj estas senigitaj.

Ĉiuj nigruloj, kiuj ne trovas laboron ĉu en la urboj, ĉu en la kamparoj, iĝas vole nevole varbitoj nomitaj "contratados". Tial hodiaŭ malgraŭ la abolicio de la malgraŭvola laboro proklamita en Ĝenevo de la Internacia Konferenco pri Laboro en la jaro 1931, la portugala koloniismo daŭrigas sklavecan ekonomion, pri kiu Angolo estas

aŭtentika ekzemplo.

La merkato de la malgraŭvola laboro subtenas kaj subfosas samtempe la ekonomion de la lando. La konstanta alvoko al la sklavecpartio estas determinita per esenca faktoro : la nuna stato de la portugala ekonomio agrara kaj antaŭindustria, la malforteco kaj la malpotenco de la portugala kapitalo sub la kontrolo de la koloniaj riĉofontoj. Ĉiuj sektoroj de la angola aktiveco nutras sin per la merkato de la subkontraktaj laboruloj liveritaj de la oficialaj instancoj.

La kompleza varbado rememorigas la tempon de la sklavkomerco inaŭgurita de portugaloj ĉe la okcidenta flanko de Afriko. Nenia elekto estas farita. Nenia familia situacio estas konsiderata. Geedzoj kun infanoj estas egale varbitaj kaj distransportitaj al diversaj regionoj. Tiel je la fino de la malgraŭvola laborperiodo, kiu estas neniam antaŭdifinita, la membroj de sama familio povas ofte ne retroviĝi pro morto, murdo kaj deportadoj ofte praktikataj de la feŭdaj mastroj. Tio estas la administrado en kolonio.

La vojprizorgado kaj la pontkonstruado estas efektivigitaj laŭ la samaj kondiĉoj per voko al la maljunuloj kaj virinoj el ĉiaj vivkondiĉoj kaj al la infanoj. Tamen tiu manlaborularo devas sin ekipi per siaj propraj laboriloj kaj havigi al si sian nutraĵon.


Estas neutile diri, ke la malgraŭvola laboro naskas la senhomigadon. Tial la landanaro de Angolo malkreskis de 34.000.000 en la jaro 1885 ĝis 17.000.000 en la jaro 1914 kaj fine de 17.000.000 ĝis 4.500.000 en la jaro 1959.


La portugalaj okupantoj metis Angolon en kompleta obskurantismo. Nenia strebo estis farita por disdoni al ĉiuj afrikaj infanoj la edukon, kiu estas kun la ekonomio, la bazo de la evoluo de popoloj. La instruado estas dispartigita en du kategoriojn : por la "civilizitoj" kaj por la "necivilizitoj". Tio estas, ke praktike ĝi ne ekzistas por la nigrula komunumo. La entuta nombro de la gelernantoj en la unuagradaj lernejoj atingas nur 40.000 kaj estas nur 4 aŭ 5 nigrulaj studentoj en la portugalaj universitatoj. La statistikoj

koncernantaj la agrikulturan instruadon estas ankaŭ edifaj. Estas neniu afrikano registrita en la sola lernejo pri la agrikultura klerigo en Angolo.

Cetere ĉu Portugalio, kiu situas ankoraŭ en la maĵora zono de la malkleruloj (44 procentoj da analfabetoj) laŭ la statistikoj de UNo en la jaro 1958 kaj kiu estas subevoluinta lando, povas ankoraŭ pretendi civilizi Angolon ?

NGANGU


KONGIO
KINŜASO
KABINDO
KABINDURBO
ZAIRO (Kongo)
Zairio
MATADI
S. SALVADOR
CARMONA
(27 000)
(350 000)
LUANDO
SAMBA CAJU
MALANJE
HENRIQUE
1270 Km
NOVO REDONDO
LUSO
(100 000)
LOBITO
2610
SILVA PORTO
BENGUELA (58 000)
NOVA LISBONO
(90 000)
2090
1730
(41 000)
SA DA BANDEIRA
SERPA PINTO
MOÇAMEDES
(16 000)
CHIANJE
PORTO ALEKSANDRO
1367
ROÇADAS
Namibio
(SUD-OKCIDENTA AFRIKO)
Atlantika Oceano




# ANGOLO

Ĉefurbo : LUANDO (350 000 loĝ.)

Administra divido: 16 distriktoj (depost 1970, antaŭe : 15)

Areo : 1 246 700 Km$^2$

Loĝantaro : 5 458 000 (1968)

Fervojoj : 3159 Km (1969)

Vojreto : 72 291 Km (1969)

- ĉefaj vojoj: 45 817 Km (1969)
- asfaltitaj: 24 593 Km (1970)

Ĉefaj produktoj kaj enspezfontoj:

- kafo (2a vico en Afriko)
- sisalo (2a vico en Afriko)
- kotono
- maizo
- fiŝkaptado
- diamanto
- fererco (hematito)
- nafto

LEGENDO :

Fervojoj - ••••••••••••••

Alta punkto - 1360

Loĝantaro• (apud urbnomo) - (58 000)

•1970, nur por la ĉefaj urboj.

## En Afriko, la Portugala popolo kulturas malamon kontraŭ si.

La 25-an de aprilo 1974, okazis en Portugalio ŝtatrenverso, dum kiu la spirita posteulo de Salazar, S-ro Marcello Caetano, estis faligita fare de kelkaj superaj oficiroj de la portugala armeo, sub la gvidado de generalo Antonio de Spinola.

Malgraŭ la ŝanĝiĝo okazinta flanke de la portugala ŝtato, la observantoj pri la kolonia politiko de Portugalio konstatas, ke la koloniistoj ne volas konsenti la sendependecon al siaj afrikaj kolonioj, sed restadi en Afriko, kiel faŝistoj, murdistoj kaj ekspluatistoj de la pacamaj popoloj de tiu bela kontinento, ĉefe de Angolo, Mozambiko kaj Gvineo.

Cetere, la Portugaloj volas forgesi, ke estas terura kaj kruela milito en Angolo, kaj tiu trudita milito estas prizorgata de la naciistaj movadoj; ili volas ankaŭ forgesi, ke la liberiga lukto daŭras de la 15-a de marto 1961; kaj tiom longe, kiom daŭros tiu peniga lukto, la Afrikanoj estos devigataj kulturi la malamon kontraŭ la Portugaloj en tiu kontinento. Ni diru, ke se la Portugaloj deziras trankvile labori en Afriko, ili devas tuj liberigi siajn koloniojn.

En la tuta mondo, junuloj ne plu akceptas la militon, ĉar ili deziras amikecon, amon kaj pacon inter ĉiuj popoloj tra la tuta mondo. Feliĉe, ankaŭ en Portugalio junuloj kaj studentoj ne plu volas iri en Afrikon por tie morti. Ĉar ili scias bone, ke ilia afero estas perdita; tial, ili volas nun esti liberaj, kiel ĉiuj junuloj de l'mondo. Kial do la portugalaj faŝistoj kaj koloniistoj volas militon por perdita afero ? Ĉu estas vere, ke la Portugaloj estas stulta popolo ? Se ne, kial senutile mortas ĝiaj junuloj ?

NGANGU

## Stulta milito ?

Necesas, ke oni tuj metu finon al la stulta milito, kiu okazas nun en Angolo, ĉar, laŭ mia opinio, kiu estas la gajnanto kaj la perdanto en tiu konflikto ? Nek Angolo, nek Portugalio !

Se estos gajnanto, tio estos la paco kaj la libereco; la perdantoj, bedaŭrinde, estos la popoloj de ambaŭ landoj, kiuj senutile sin mortigas reciproke.

Antaŭ nelonge, mi aŭdis Angolanojn dirantajn, ke se Portugalio konsentas la sendependecon al Angolo, ili forgesos la malfacilaĵojn, kiujn la milito kaŭzis, ĉar ili konsideras tion, kiel produktojn de la malkompreno de koloniistoj, kiuj mem estis trompitaj de la kolonianoj, ekspluatistoj.

Amiko skribis al mi la jenajn liniojn pri la koloniismo en Angolo. Ni lasu la parolon al tiu amiko :

"La portugala popolo estas tre malfeliĉa popolo; mia frato, daŭrigis mia eŭropa amiko, iam iris en tiun landon (Portugalio) por labori dum kelkaj tagoj kaj konstatis tion. La portugala registaro estas faŝisma, Caetano estas diktatoro kaj multaj oficiroj volas daŭrigi la militon en la kolonioj - kaj ĉefe en Angolo - sed pli kaj pli da aliaj komencas malakcepti tiun sintenon".

Ĉiam pri la milito en Angolo mia amiko aldonis :

"Persone, mi estas konvinkita, ke Angolo iam liberiĝos, kaj la helpo de Usono al Portugalio neniel ŝanĝos ion al tiu antaŭvidebla evoluo. Estas necese komprenigi al la portugala popolo, ke ĝia armeo ne estas en Angolo por fari "civilizan mision" aŭ por pacigi tiun landon, sed por pliriĉigi kelkajn ekspluatistojn. La portugala popolo ne profitas el tiu milito, multaj el ĝiaj filoj mortis antaŭ ol kompreni tiun aferon; multaj aliaj dizertis aŭ foriris el Portugalio antaŭ la aĝo de la militservo. Fakte, la portugala popolo estas trompata, sed jam aperas signoj de vekiĝo."

Certe mia interparolanto antaŭdiris pri aktuala situacio en Portugalio. Malfeliĉe, la nuna Respublikestro, S-ro Spinola, ŝajnas opinii malsimile al generalo Spinola, la aŭtoro de "Portugal e o futuro".

NGANGU

## Kruda popolo ?

De 50 jaroj, Portugalio spertis faŝismon. Tio estas, ĉiuj portugalaj loĝantoj neniam spertis demokration kaj liberecon; ili ankoraŭ ne scias, kiel liberigi koloniojn. Tial, la legantoj de ĉi tiu broŝuro devas helpi niajn portugalajn amikojn, konsiderante, ke la sola vojo al paco estas la sendependeco de la portugalaj kolonioj, kaj ke la ĉefa alternativo al paco estas ankaŭ kaj antaŭ ĉio la dialogo kune kun la reprezentantoj de la politikaj partioj, ĉefe la afrikaj liberigaj movadoj.

Bedaŭrinde, malgraŭ la instruoj de la historio, la portugala registaro volas ankoraŭ restadi en Afriko, kiel kolonia potenco, tiel kulturante, malrapide sed certe, la malamon kontraŭ sia popolo.

Ankaŭ en Afriko oni konsideras la Portugalojn, kiel barbaran kaj krudan popolon, kiu kvazaŭ vivas en la deksepa jarcento, tio estas, ĝi malfruas ankoraŭ tri jarcentojn. Estas honto !

Domaĝe, ke Spinola kaj precipe la portugala junulo ne povas kompreni tiun situacion.

NGANGU

o o o

Alberto Pedro da Silva :

En la antaŭa jarcento, kiam en Portugalio stariĝis la liberalisma reĝimo; en la jaro 1910, kiam la demokrata respubliko estis proklamata, jam la portugala popolo agnoskis la rajton de la afrikanoj pri memdispono kaj lukto kontraŭ la portugala koloniismo ĝis la plena sendependiĝo de siaj landoj.

Alia deklaro pri tiu popola sinteno okazis en la jaro 1925. Laborista kongreso unuvoĉe konsideris la afrikajn laboristojn kamaradoj kaj viktimoj de la kapitalismo kaj imperiismo, same kiel ni mem, la eŭropanoj. La reprezentantoj de la sindikatoj proponis indiki al la afrikaj kamaradoj siajn spertojn pri la movado kaj ties luktaj metodoj. Krome, ankaŭ ili povus ricevi helpon okaze de ribelo por la sendependeco de siaj landoj.

Nenio konkretiĝis, ĉar, en la jaro 1926, la faŝistoj almilitis la regadon en la lando kaj ni ĉiuj, afrikanoj kaj eŭropanoj viktimiĝis pro la teruraj subpremo, persekutoj, mallibero kaj multaj aliaj krimoj.

Unu el la plej grandaj krimoj de la faŝistoj okazis antaŭ 13 jaroj. Tiam la afrikaj popoloj ekribelis kontraŭ la portugala koloniismo, postulante la sendependecon de siaj teritorioj. La faŝistoj, inter akcepti la politikan dialogon por solvi la kverelon kaj oponi teruran militon, elektis la lastan rimedon. Ĝi daŭris 13 jarojn.

La mondkonata aventuro de la ŝipo "Santa Maria" celis helpi la ribelulojn. Dum la daŭro de la milito la portugalia popolo kontraŭstaris la koloniisman politikon de la faŝista registaro, kiu stulte kreis la militon. Multaj soldatoj dizertis, junuloj serĉis rifuĝon en eksterlando, kaj multaj popolanoj putris en la karceroj de la plej abomeninda kaj malhumana politika polico.

Kaj la milito, kondamninda kiel ĉiuj militoj, daŭris ĝis la falo de la faŝismo la 25-an de aprilo 1974.

...

Konsekvence de ĉi tiu politika renverso, kiu restarigis la demokratajn liberojn en Portugalio, unu el la

plej urĝaj taskoj estis la paca solvo de la tuja sendependo de la kolonioj.

Pro la sincereco montrita per la vortoj kaj procedoj de la nova registaro, la afrikaj ribelantaj movadoj tuj interkonsentis renkontiĝojn kun la portugalaj reprezentantoj cele al fino de la milito kaj sendependeco de la portugalaj kolonioj.

Sekve, la 27-an de julio 1974, la respublika prezidento deklaris al la portugalaj popoloj, ke milito ne plu estas en Afriko, ke ĉiuj portugalaj kolonioj estas sendependaj kaj la du armeoj kunfandiĝos por la defendo de la popoloj kontraŭ iu ajn agreso. Baldaŭ oni interkonsentos pri la dato, kiam okazos la transdono de la povoj.

Tiel estas plenumita programero de revolucio de la 25-a de aprilo 1974, kiu interpretas la deziregon de la portugalaj popoloj.

Portugalio ekde nun estas fide rigardata, ĉiuj demokrataj kaj socialistaj registaroj sankcias ties kontraŭkoloniistan politikon. Hodiaŭ oni povas aserti, ke Portugalio revenis al Eŭropo, el kiu ĝi estis apartigita dum preskaŭ duonjarcento.

Post ĉi tiuj pruvoj, ke la portugaloj estas pacama popolo, kiu deziras kunvivi harmonie kun ĉiuj aliaj popoloj, neniu rajtas respondecigi tutan loĝantaron pri la krimoj faritaj nur de la faŝistoj.

Mi esperas, ke la supraj vortoj sukcesos komprenigi la veran situacion de la portugaloj antaŭ la koloniisma problemo.

En Lisbono,
30-an de julio 1974.

<u>Alberto Pedro da Silva</u>.

Aneksaĵoj:

## Ni ne batalas kontraŭ la portugala popolo

- ekstraktoj el deklaro de A. Cabral (°) -

"Ni ne batalas kontraŭ la portugala popolo, kontraŭ la portugalaj individuoj aŭ familioj. Neniam konfuzante la popolon de Portugalio kaj la portugalan koloniismon, ni estis devigataj uzi la armilojn por malaperigi la hontindan portugalan superregadon el la tero de nia afrika patrujo.

En sia provo de genocido, vana sed ne malpli krima, la portugalaj koloniistoj ĉiutage praktikas teroragojn kontraŭ la pacemaj loĝantoj de niaj liberigitaj regionoj, precipe kontraŭ virinoj, infanoj kaj maljunuloj; ili bombadas kaj mitrajlas niajn loĝantojn, cindrigas niajn vilaĝojn kaj forbruligas niajn rikoltojn per ĉiuspecaj bomboj, precipe fragmentiĝ-, napalm- aŭ blankfosfor-bomboj.

... Ni altiras plian fojon la atenton de la monda opinio pri la krimoj farataj de la portugalaj koloniistoj en nia lando. Tiujn krimojn ili ne estus kapablaj fari, se ili ne disponus pri la politika kaj materiala helpo de siaj aliancanoj.

La celo de nia batalo estas la konkero de nacia sendependiĝo por nia popolo."

(El "Bulletin du Comité de Soutien aux Déserteurs et Réfractaires Portugais", majo 1973)

(°) murdita fare de la portugalaj koloniistoj.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## Politika rifuĝrajto

En Francio estas nun proksimume 70 000 junaj portugaloj en militserva aĝo. Tiuj junuloj estas :

- la dizertintoj : ili forlasis la armeon post sia enregimentiĝo, kiam ili estis ankoraŭ en Portugalio, aŭ kiam ili estis jam komencintaj la koloniistan militon.
- la militrifuzantoj : ili venis al Francio post la rekrutekzameno sed antaŭ ol esti kunvokitaj kaj enregimentigitaj.

- la rekrutfuĝuloj : ili neniam sin prezentis antaŭ la rekrutekzamenantaro.

Kiu ajn estas ilia kazo, ilia rifuzo partopreni en la koloniista milito kondukita de la faŝisma portugala registaro kontraŭ Angolo, Gvineo Biso kaj Mozambiko, kun apogo de la internacia imperiismo, estas opinimanifestiĝo kontraŭ la portugala koloniismo en Afriko.

Tiu ago devus aŭtomate rajtigi al statuto de politika rifuĝinto la junajn portugalajn dizertintojn kaj militrifuzantojn en la landoj, en kiujn ili rifuĝas - inter kiuj la plimulto subskribis la Konvencion de Ĝenevo.

Fakte, laŭ la Konvencio de Ĝenevo :

"... Devas esti konsiderata kiel rifuĝinto tiu, kiu, timante esti persekutata pro sia rasa, religia aparteno aŭ sia nacieco, pro sia aparteno al certa socigrupo aŭ pro siaj opinioj politikaj, sin trovas ekster la lando, kies naciecon li havas, kaj ne povas aŭ - pro tiu timo - ne volas pretendi pri la protektado de tiu lando."

La politika ago, kiu konsistas rifuzi fari nejustan koloniistan militon sekvigas en Portugalio malliberejan punon de 6 ĝis 8 jaroj, kaj ĉiuspecajn subpremajn rimedojn flanke de la sinistra PIDE, portugala Gestapo.

Do, flanke de la junaj portugaloj, dizertintoj kaj militrifuzantoj, ĝi estigas pravigeblan timon pretendi pri la protektado de sia registaro kaj devus aŭtomate doni al ili la rajton pri statuto de politika rifuĝinto, konforme al la Konvencio de Ĝenevo.

(El "Comité de Soutien aux Déserteurs et Réfractaires Portugais", majo 1973).

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## Deklaro de la kolektivo de la dizertintoj

- militrifuzantoj de la armeaj fortoj de la portugala ŝtato -

Ĉar ĝi vivas parazite per la ekspluatado de la laboristaj klasoj, la armeo estas en ĉiuj societoj senescepte maŝino, kiu muelas la homojn; kaj ĝi rolas kiel subtenanto de la ekzistanta sociordo kaj defendanto de la reganta

klaso en ĉiu lando kaj de ties naciaj interesoj en la kunfrontado kun tiuj de la regantaj klasoj alilandaj. La armeo estas la institucio en kiu la junaj laboristoj suferas la unuan organizitan kaj nepacigeblan superregadon de la reganta klaso.

La nacia sendependeco ne konsistigas progresisman etapon en la emancipiĝo de la laboristoj, sed nur la daŭrigo de ilia ekspluatado sub formo pli profitodona por la kapitalo. Jam la organizado de naciismaj movadoj dependas de tiuj limoj kaj bazas sin sur la malnovaj skemoj de socia divido de la laboro, de povo kaj de decido.

La naciismaj organizoj, kiam ili havos la regpovon, povos nur proponi alvokon (kiun sekvos la subpremado) al "sinofero" por la konstruo de la ŝatata patrujo ! Kiom da similaĵoj kun la taktiko de la portugala reganta maldekstrularo !

Ni konsideras iluzia la sintenon, kiu konsistas nuntempe eniri la armeajn fortojn por ilin subfosi. La militmaŝino subpremos ĉiujn provojn en tiu senco. Ĝi akceptos nur partoprenon al la reformisma projekto de la Movado de la Armeaj Fortoj.

Ni estas solidaraj kaj subtenantoj de neniu naciisma organizo, kiu sin pretendas reprezenteca de la subpremataj popoloj, kies ekspluatado daŭros post la sendependiĝo sub nova klasregado.

(El "Union Pacifiste"
aŭg.-sept.1974)

Broŝura serio de LJP.
adreso : La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut
poŝtkonto : La Juna Penso, 3 374 04 M, Bordeaux

Abonoj al la broŝura serio por 1975 kaj 1976 : 20 FF
La abonanto ricevos 12 broŝurojn (sume pli ol 500 paĝoj)
kun 20 % da rabato el la menciitaj prezoj :

| | | FF |
|---|---|---|
| HM. | A.Pannekoek: Historia materiismo - Organizado | 1,25 |
| KE. | Han Riner: La Kvina Evangelio | 6. |
| HH. | Lanti: Herezulo - Herezaĵo | 1,50 |
| MV. | N.Bartelmes: Mia vivo - Dek artikoloj | 2,50 |
| IM. | Han Riner: Individuista Manlibreto | 1,50 |
| LV. | Fontaura: Liberecanaj vivkonceptoj | 1,25 |
| NA. | R.Luksemburg: Naciecaj problemoj | 1,50 |
| HT. | Bazalgette: Henry-David Thoreau | 1. |
| KD. | Sébastien Faure: La Krimoj de Dio | 1,50 |
| TH. | J.Ingenieros: La triviala homo | 3,50 |
| RA. | Kropotkin: Revolucia registaro aŭ anarkio ? | 1,50 |
| TK. | Johano Rostand: Tiu, kiu ne volas morti | 1. |

Mendoj : ĉiu ajn povas mendi laŭ la ĉi-supra kaj ĉi-suba listoj. La prezoj inkludas la afrankon.
Aliaj broŝuroj disponeblaj :

| | | FF |
|---|---|---|
| LE. | Lanti: La laborista esperantismo | 1,25 |
| NR. | T.Ebert: Ĉu neperforta revolucio... | 1,25 |
| GL. | J.Duboin: Granda liberiĝo de l'homoj | 1,25 |
| PE. | Lanti: Pri edukado | 1,50 |
| EV. | Krishnamurti: Eduko kaj vivsignifo. Rimarki | 1,50 |
| MS. | La Boesi: Memvola servuto | 1,50 |
| EH. | Esperanto en 24 påginas (por hispanlingvanoj) | 1. |
| NP. | S.J.Lec: Nekombitaj pensoj | 1,25 |
| RS. | J.Burger: Rido sanigas! (satira poemaro) | 1,50 |
| LP. | La liberecana penso (citaĵoj) | 1,25 |
| AO. | Malatesta: Anarkio kaj organizo | 1,25 |
| AB. | Lanti: Absolutismo | 1. |
| NM. | Tolstoj: Ne mortigu! | 0,50 |
| PI. | P.Lafargue: La rajto de pigro | 1,50 |
| HP. | E.Relgis: La humanitaristaj principoj | 1,25 |
| PC. | E.Bellamy: La parabolo pri la cisterno | 0,75 |
| DU. | Pario: Durruti, simbolo de la hispana revoluc. | 1,25 |
| PT. | Domela Nieuwenhuis: Piramido de l'tiranismo | 1,50 |
| PO. | A.Cohen: Paco en proksima oriento | 1,25 |
| AC. | R.Levreaud: Atomcentraloj (debato) | 1,25 |
| TM. | Alfa-Beta: Tra la mondo per biciklo kaj esp. | 1,50 |

Gérant : Baudé - Imprimeur: Le Galès, 67 Franceville, 93220 GAGNY